# Informaj tabuloj pri Esperanto.



*La tabulo en stacio Prešov.*

La apuda rapide farita bildo ne prezentas al vi en sufiĉa klaro la aspekton de la brila tabulo, kiu jam servas en plejparto de gravaj stacidomoj de nia respubliko kaj kiu ornamas multajn klubejojn. Fervoraj samideanoj plurloke ĝin fiksis ankaŭ ĉe siaj loĝejoj.

Pruviĝas la pravo de la malnova konstato pri forta valoro de samaspektaj reklamiloj grandnombraj. La multfoje revokita impreso per ripete vidata samforma tabulo kun kvinpinta stelo verda kaj voko: „ESPERANTO-INFORMO" restas en la menso de la multaj pasantoj. Apenaŭ oni povas imagi pli taŭgan lokon por atentigi pri nia vivo, ol estas la stacidomoj. La tabuloj plenumas tie perfekte sian unuan celon — konduki la vojaĝantajn esperantistojn al plej proksima informejo — kaj daŭre atestas, ke ankaŭ tiu loko tenas alte la verdan standardon. La fervoja ministerio, permesante la fikson en la stacidomoj, montris bonan komprenon al niaj klopodoj.

Nian instigan laboron provas nun sekvi aliaj ŝtatoj. Ni estu feliĉaj, se nia ekzemplo kaŭzos grandan manifeston de verda stelo en la tuta mondo.

Ni donas nun ĉiun utilan detalon:

La lada dukolora tabulo 420x297 mm kun premitaj verda stelo kaj surskribo ESPERANTO-INFORMO kaj kun pentrita loka adreso estas ekspedata post ricevo de Kč 26·—. Ricevinte tiun sumon, zorgas ĈAE ankaŭ pri fikso en la stacidomo (utilos, se vi interkonsentiĝos kun la staciestro pri preciza loko) kaj pagos ĝis fino de kuranta jaro la sumon por ĝia lokigo. Pagotaj estas poste ĉiam en oktobro Kč 6·— por jaro venonta sen plua atentigo por ŝpari neutilajn elspezojn korespondajn.

Se vi deziras la tabulon por alia supre menciita celo (klubo, loĝejo ktp.), ĝi povas fariĝi via posedaĵo por Kč 15·—. Kun via adreso ĝi kostos Kč 20·—. La livero okazas afrankite.

Adreso surpentrota devas esti plej konciza (5—6 vortoj). Por teksto pli longa alpagu 5—10 Kč.

Por via mendo uzu la suban formulon, kies enhavon bonvolu atente sekvi.

*Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.*

---

## *MENDILO DE INFORMA TABULO.*

### *Al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha XIX., Uralské nám. 447.*

*Mi mendas por la stacidomo(j):* ..................................................

.............. *tabulo(j)n po Kč 26·— kaj mi sendas la sumon de Kč* .................. *per poŝta blankopagilo al la konto n-ro 9602 de Svaz československých esperantistů, Praha. Por ŝpari, mi ne uzas alian pagmanieron.*

*Mi deklaras, ke mi ĉiujare ĝis fino de oktobro sen ia admono pagos Kč 6·— por la venonta jaro po ĉiu tabulo. Mi anoncos plej malfrue ĝis 1-a de septembro, se mi ne deziros dum venonta jaro havi la tabulon en la stacidomo.*

*Mi mendas krome por alia celo (klubo, loĝejo ktp.)* .......... *tabulo(j)n kun malplena adresa spaco po Kč 15·—, kun jena teksto:* ..................................................

*po Kč 20·—. La sumon de Kč* .................. *mi sendas laŭ supra maniero.*

*Por pli longa teksto mi alpagas samtempe Kč* ..................

*En* .............................. *la* .............................. *193*.....

*Subskribo kaj adreso, eventuale kun kluba stampo:*

..................................................

No. 2.-3. **BULTENO** 1934. 30. IV.

**DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: Dr. ST. KAMARYT Dr. A. PITLÍK*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

## La XV-a ĝenerala kunveno de Ĉeĥosl. Asocio Esperantista

okazis la 18-an de marto 1934 en Praha en kafejo Louvre.

Ĉeestis 49 membroj, skribe reprezentitaj 71, sume 120 membroj. Krome 15 gastoj. La ĉeestantoj estis el Bratislava, České Budějovice, Hořice v Podkr., Hradec Král., Jablonec n. N., Kolín, Košice, Lázně Bělohrad, Liberec, Mladá Boleslav, Neugarten, Olomouc, Podmokly, Praha, Prostějov, Rumburk, Tisovec, Trnovany, Zborovice. Sume el 19 lokoj. Inter la ĉeestintoj aparte estas menciinda dr. A. Batěk.

La kunveno daŭris de 9·30 ĝis 13 h.

Post malfermo de la kunveno rememoriĝis la prezidanto pri subita morto de F. Schoofs kaj pri la mortintaj membroj K. Bartoš (Volfířov), Jar. Pokorný (Zastávka u B)., Jos. Pumr (Hradec Králové), Emilie Najmanová (Jičín), Vincenc Reichelt (Mladá Boleslav). La ĉeestantoj honoriĝis la rememoron pri ili per ekstaro.

S a l u t o j. La prezidanto salutis reprezentantojn de GEL (prez. prof. inĝ. G. Scholze, Dr. Josef Pontz, B. Bräuer), de ARE (prof. Murath), SOČNE (A. Dirnová), Asocio de ĉsl. skoltoj (Lešinger), ĵurnaliston el Batavia Haĝi Mustafa Raden. La salutitoj respondis per esprimo de siaj salutoj. — Salutaj leteroj kaj telegramoj venis de REL, kluboj de Praha, Bratislava, ARE, Kulturklubo en Brno, E. K. Uh. Hradiště, E. K. L. Bělohrad, Šupichová, dr. Fousek, Bartošík, Vondroušek, Krisl, Strejčková, Šamla, Pytloun, Herzigová. — Por ILEPTO salutis kunvenon Votrubec.

1. **Protokolo pri la lasta ĝener. kunveno** ne estis laŭtlegita, ĉar ĝi estis publikigita kaj neniu deziris la legadon.

2. **Raporto de la komitato pri la agado kaj pri la kaso.** Ĉar ĉiuj membroj ricevis ĝin presitan en 1-a n-ro de la Bulteno, la kunveno konsentis ne legi ĝin kaj tuj diskuti pri la koncernaj alineoj.

a) K o l e k t o p o r o f i c e j a f o n d a ĵ o. La prezidanto plendis pro la malgrasaj nombroj atingitaj. Li petis, ke la membroj multe pli atentu pri tiu kolekto, kies celo estas ekstreme grava.

b) V a r b a d o d e l a m e m b r o j. La prezidanto aludis la plendojn de pluraj komitatanoj, ke ili renkontis ĉe provoj pri persona kontakto kun esperantistoj en diversaj lokoj nekomprenéblan seintereson por aŭdi ion pri la movado. Li mem ekz. malsukcesis petante esperantistojn en Č. Budějovice por fiksi tagon de kunveno kun li, kiam li libertempis en proksima urbeto. Kaj tamen estas en Čes. Budějovice du kluboj. Friedrich rakontas pri neafablaj respondoj, kiujn li ricevis proponante sin por senpaga vizito kaj prelego en Ostrava-regiono. Šustr informas pri malgranda emo, kiun vidiĝis Pardubice al proponoj pri prelegoj de Ajayi kaj Raden. Sklenčka atentigas, ke 1800 kovertoj kun cirkuleroj pri unuecigo restis sen respondo; tio ankaŭ estas grava simptomo, ke ne ĉiuj esp-istoj ĝis nun ankoraŭ plene komprenas gravecon de organizo. S-ino Peinlová (el Č. Budějovice) klarigis, ke la klubo Progreso daŭre laboras dank' al persisto de s-ro Ploss; estas lia merito fondo de grupo en Vodňany. Friedrich insistas pri graveco daŭre varbi la membrojn; sed nepre same grave estas konservi ilin, kio plej efike fariĝas per persona kontakto kun grupoj, ankaŭ kun tiuj, kiuj nur estas fondataj. Vítek rekomendas manieron de sia klubo en Tisovec; ĝi mem sen ĉiu iniciato el centro prilaboras sian ĉirkaŭaĵon; la sukceso estas konata. Peinlová informas, ke la klubo Progreso en Č. Budějovice aranĝis 3 prelegojn de Raden; ĝi estas pruvo pri aktiveco de tiu ĉi klubo. La prezidanto deklaras, ke per rakonto pri siaj spertoj neniel li volis kritiki bonan volon de iu ajn; male, li mem konvinkiĝis pri la granda sindonemo kaj laboremo, kiujn dediĉas s-o Ploss al nia afero. Sklenčka sciiĝas pri letero el Kutná Hora, informanta pri neebleco pagi pli ol kotizon de unusola membro. Li konkludas la diskuton per konstato, ke loka sukceso tre dependas de taŭgaj homoj, kiujn ni daŭre devas eduki.

c) A d m i n i s t r a d o d e l a m e m b r o j. Sklenčka rekomendas al la legantoj de la

raporto kontroli la statistikon tie donitan pri siaj lokoj. Koncernaj informoj estos tre utilaj.

d) Prelegvojaĝoj de fremdlandaj esp-istoj. Sklenčka insistas pri graveco de tiaj entreprenoj kaj rekomendas, ke ĉiun jaron oni sendu ian preleganton; kompreneble ne estas daŭre sendenda ekzotika persono. Ankaŭ anglo, svedo aŭ simile efikos. Peinlová diras, ke en Č. Budějovice Ajayi ne kontentigis plene; oni atendis tute alian prelegon. Šustr: estas malfacile kontentigi ĉies guston; venis el multaj lokoj esprimoj de tre bona kontenteco.

e) Radio. Laŭ propono de la komitato la kunveno decidas esprimi al Radio-journal, precipe al sekcio Brno, dankon pro kompreno de praveco de esp.-disaŭdigoj.

f) Stacidomaj tabuloj. Ginz atentigas, ke la unua permeso de la ministerio estis donita jam en 1923 al nia Asocio. Kamaryt rekomendas al ĉiuj zorgi pri baldaŭa lokigo de multaj tabuloj en stacidomoj kaj sur privataj muroj. Friedrich insistas pri efiko, kiu rezultas el unuformeco de la propagandaj tabuloj.

g) Kaso. Pro malkresko de la Asocia kapitalo la komitato ne rekomendas doti la fondaĵojn ĉi jare.

3. **Raporto de la revizoroj.** Prezidanto de la kontrola komisiono V. Černý raportis: Mi kontrolis librotenadon de la Asocio dum la pasinta jaro. Unuopajn dokumentojn mi esploris materiale kaj komparis ilin kun enskriboj en la libroj, ankaŭ bilancojn ferman kaj perdo-gajnan, kaj ceterajn kontojn tenatajn; ĉion mi trovis en plena ordo. Tial mi rekomendas al la ĝenerala kunveno aprobi la jarajn raportojn pri j. 1933 kaj doni absolutorion al komitatanoj.

Poste estis raportoj pri agado kaj pri la kaso ĉiuvoĉe aprobitaj.

4. **Elektoj.** La prezidanto informas, ke eliras el la komitato pro 3-jara funkcio Fr. Staněk, Šustr, Tarantíková, Vondroušek, pro rezigno Slavík. La prezidanto dankas samideanon Slavík pro multaj oferoj, kiujn li estis dediĉinta al nia Asocio. Kiam li nun pro personaj motivoj ne povas plu dediĉi tiom da tempo por ni, ne havas ni rajton lin persvadi. Sed ni tre kontente deklaras lian promeson, ke li ne ĉesos kunlabori komplete, sed lasos al si kelkajn difinitajn taskojn. La komitato proponas por la vakiĝintaj lokoj: Heikenwälder, Fr. Staněk, Šustr, Ginz, Vondroušek. Por la vickomitatanoj estas proponata listo: Dr. Fousek, Valašťan-Dolinský, Tarantíková, Mil. Staněk, Krisl, Janda [en Kolín], Beran [Lázně Bělohrad]. Por membroj kaj vicmembroj de la kontrola komisiono estas proponata la pasintjara listo, sole sur loko de s-ro Linke eliranta s-ro inž. Rud. Novák. La propono de la komitato estis akceptita ĉiuvoĉe. La listo rezultinta el tiu elekto estas pubblikigita sube. La prezidanto esprimas sinceran dankon de la Asocio al la funkciuloj ne plu elektataj: Josef Janda, Božena Vlčková, Ferd. Votrubec, J. Linke pro ilia daŭra kunlaborado. Por estro de poŝtista komisiono estis elektita F. Votrubec.

5. **Liberaj proponoj.**

a) Propono de T. Bobula [Košice], ke inter inicialoj de la asocia nomo-mallongigo estu ankaŭ S post la Ĉ, estos transdonita al komitato de la fondota tutŝtata asocio, ĉar por ni jam ne estas aktuala.

b) S-o Sklenčka atentigas, ke Internacia somerrestadejo en Lázně Belohrad estos tiun jaron aranĝita jam la trian fojon. La entreprenon denove organizas la loka klubo. La kunveno rekomendas al ĉiuj membroj atenti tiun ĉi tre gravan entreprenon kaj laŭeble ekskursi dum julio-aŭgusto tien aŭ lui tie somerrestadejon.

c) Ceteraj venintaj proponoj koncernas la fondon de la nova centro; oni pritraktos ilin laŭ okazo.

6. **Fondo de tutŝtata centro.** La prezidanto skizas la ĝisnunan staton de la afero. La eksterregula kunveno decidis fondi tutŝtatan centron kaj turni sin al GEL kaj ceteraj organizoj en la lando por kunlaboro. La kunveno akceptis rekomendindajn principojn kaj projekton de la statuto, verkita de Friedrich, kiel bazo de fina interkonsento. La prezidanto tre ĝojas, ke GEL akceptis la inviton kaj sendis 3 siajn funkciulojn por aŭdi kaj diri la opiniojn pri tiu ĉi tasko. Ankaŭ li tre ĝojas pro ĉeesto de reprezentanto de ARE. Friedrich resumas agadon de la porstatuta komisiono elektita en la eksterregula ĝen. kunveno [Friedrich, Sklenčka, Kamaryt]. La teksto ricevis jam multajn aldonojn kaj korektojn. Ĉar ni ne rigardis la tekston definitiva, ni ne kopiigis ĝin en pluraj ekzempleroj. Tial ni povis sendi al GEL kaj al ARE sole unu ekzempleron. Ni estas tre dankemaj al GEL pro tradukigo en germanan lingvon kaj por publikigo en ĝia Bulteno. La kritikojn de dr. Pontz ni ĉiuj legis kun granda intereso kaj zorge primeditis ilin. Kelkaj riproĉoj estas tre pravaj. Ekz. ni jam forstrekis rajton de la ĝenerala kunveno aprobi la komitatanojn, senditajn de la naciaj sekcioj. Sed pri la ĉefa riproĉo,

ke la statuto estas tro centraliza, bonvolu dr. Pontz atenti, ke ja temas pri statuto de la centro. Ne estas ankoraŭ verkitaj regularoj de la naciaj sekcioj, nek regularoj de la lokaj grupoj. Ni pensas, ke tiuj regularoj devas ĝuste eliri jam el la komuna kunlaboro de germanoj kaj ĉeĥoslovakoj. Sklenčka atentigis pri la cifera rezulto de respondoj al la cirkulero pri unuecigo, dissendita de Teritoria oficejo.

Prezidanto de GEL inĝ. prof. Scholze informas: GEL kaj ĈAE estas memstaraj asocioj naciaj, kiuj estas internacie kunligitaj jam per UEA en Genève. GEL havas komplete ellaboritan organizo-piramidon. Ĉiaj lokaj grupoj estas efektivaj lokaj grupoj de la nacia centro; ili estas kunigitaj laŭ distriktoj, kiuj havas regulan laŭinstancan rilaton al la centro. Oni ne povas la unuecigon simple dikti de supre. Male, tia unuecigo devas eliri el la lokaj grupoj, la anoj devas esti por tio edukataj. La nuna bona funkciado de GEL estas atingita ja per tia evoluo iom-post-ioma. Por celoj de tutŝtata intereso povus funkcii kiel pinta organizo komitato el delegitoj de la ambaŭ du naciaj centroj. En tiaspeca komitato povus kunlabori ankaŭ laboristoj kaj katolikoj, kiuj konate ne volas esti organizataj en la neŭtrala movado, se ĝi volas prezenti la oficialan movadon.

D-ro Pontz pensas, ke la momento ne estas ankoraŭ matura por tia iniciato. Estas malfacile teksti la paragrafojn, kiuj difinus taŭge la principojn ebligantajn aŭtonomian laboron de la laŭnaciaj sekcioj.

Sklenčka: Germanaj amikoj proponas federacion. Ni volas ion pli klaran. Federacion ni posedis laŭ la malnova sistemo en internacia organizo. Sed ĝuste tiun formon oni malakceptis. Unuecigo internacia estis grava paŝo. Se ni faris tiun paŝon, ni logike faru la duan: unuecigon en la enlanda movado. Neniam estos ĉiuj kontentaj. Ĉiam ekzistos samideanoj starantaj ekstere. Ni volas krei novan domon. La plano trovis aprobon tre rimarkindan. El 733 respondoj estas 708 aprobantaj [inter ili 100germanaj]. Tiu rezulto devigas nin, provi la konstruon de la domo.

Kamaryt: Se ni diras, ke la germana sekcio estos aŭtonomia en sfero de propaganda laboro, la germanaj amikoj ne rigardu tion kiel proponon de iaspeca koncedo. Ni nenion volas kaj rajtas koncedi. Ĉar aŭtonomio de germanoj en la sekcio signifas por ni la saman aŭtonomion en sekcio nia.

Scholze: Sed ĉu la homoj ne sentos sin ĝenataj ĝuste pro la statuto, estu ĝi kiom ajn perfekta? Estas grave, ke ne ekzistu eĉ ŝajno de ia perforto. La lokaj grupoj devas esti nuligataj kaj denove fondataj, kio kostos multe da mono, ŝparinda en kriza tempo.

Friedrich: Nun ekzistas fakte kvar organizoj: ĈAE, GEL, REL, ARE. En Slovakio volas en loka grupo kunlabori ĉiuj nacioj de la loko. Tie estas tendenco kontraŭ la divido de la membroj laŭ la lingvo. Divido de esp-istoj en tiom da centroj estas stato malsana. Se ni restos daŭre tiom malfortaj laŭ la nombro, estas versimile, ke estiĝos ankoraŭ pluraj „centroj". Laboristoj kaj aliaj fakaj organizoj kunlaboros pli volonte kun forta neŭtrala centro ol kun centro malforta. La demando estas, ĉu la germanaj amikoj estas principe emaj kunlabori en komuna centro. Se ili jesos tiun demandon, poste la formalaĵoj estos facile solveblaj. Unusola centro estas ankaŭ bezona por reprezento de la movado antaŭ la fremdlando. UEA bezonas havi unu landan organizon. Tiele estas ja ankaŭ en Belgujo, Pollando kaj alie, kie ankaŭ loĝas naciaj minoritatoj.

Sklenčka: Unusola centro signifos rimarkindan simpligon de la administrado.

Dr. Pontz: UEA-teritoria oficejo estas ja jam organo unueciganta. Estas grave atenti rilaton inter la centro kaj la periferio. Ni ĉiuj deziras kunlaboron. Diferenco estas sole en la metodoj. La rimedoj de la dezirata kunlaboro povas esti duecaj. Vi pensas, ke la plej grava afero estas la statuto. Mi estas konvinkita, ke la ekstera kadro ne estas gravaĵo. En Aussig mi vidis bonan modelon de kunlaboro inter ĉeĥoj kaj germanoj. Sed ĉu la tempo estas jam matura por tia kunlaborado en la tuta lando? Mi dubas pri tio. La ĝener. kunveno de GEL decidis pri principo kunlabori jese. Ni diskonigis la projekton de la statuto. Kvankam la GEL ne povis decidi pri aliĝo, ĝi tamen deklaris sian pretecon kunlabori.

Friedrich: La tempo estas ĵus taŭga. La ciferoj de la plebiscito estas tre elokventaj. Multaj akceptos la decidon pri fondo de unusola enlanda centro kun ĝojo.

Murath: Kondiĉo por kunlaboro de la du partioj estas konfido. Mi ĝin ankoraŭ ne vidas en sufiĉa kvanto ĉe la ambaŭ partioj. Sed ĝi mem evoluiĝos dum komuna laborado. La spertoj pri kunlaborado de germanoj kaj ĉeĥoj en ARE estas tre kontentigaj. La kriti-

kataj normoj de la projektata statuto estas plibonigeblaj per komuna kunlaboro de la komisiono. Sed la komuna centro estos certe nepre utila kaj ĝi estas tre bezona jam nun.

Kamaryt: Tio estas ankaŭ nia opinio. Nia ekzemplero de statuto-projekto estas jam plena de eldonoj kaj korektoj. La ideoj pri novaj tekstoj venas el la diskutoj kaj el la korespondado.

Bräuer konsentas kun prof. Murath pri bezono krei komunan centron el GEL, ARE kaj ĈAE kun statuto, kiu respondos al bezonoj kaj deziroj de ĉiuj.

Dr. Pitlík: Granda utilo de la tutŝtata centro estos ankaŭ, ke povos eniri en ĝin kiel fakoj diversaj institucioj, kiuj ĝis nun staras ekster la organiza kadro.

Kamaryt informas, ke laŭ letero de L. Krysta ĉiuj anoj de REL estas konvinkitaj, ke ŝtata organizo estas necesa. Fine li demandas, ĉu la reprezentantoj de GEL konsentas eniri en la porstatutan komisionon de ĈAE kiel samrajtaj membroj por finredakti la statuton.

Scholze deklaras, ke GEL estas preta. Kiel anojn de la komisiono li nomigas la ĉeestantajn 3 komitatanojn de GEL: Scholze, dr. Pontz, Bräuer.

Krom ili la kunveno elektas ankoraŭ profesoron Murath por ARE kaj decidas, ke ankaŭ REL estos petata sendi 1 anon por la komisiono. La komisiono estas petata fini sian laboron plej malfrue ĝis 30-a de aprilo. La teksto de statuto estos donita al komitatoj de ĈAE kaj GEL pro fina aprobo.

Tiuj normoj estis aprobitaj de ĉiuj ĉeestantoj unuanime.

Prezidanto d-ro Kamaryt esprimas la deziron, ke la aprobo kaj eventualaj ŝanĝoj povu esti faritaj de la du komitatoj plej malfrue ĝis la 30-a de majo.

Prez. de GEL Scholze esprimas sian kontentecon pri la amika interŝanĝo de ideoj kaj deziron, ke la plua agado okazu sur la demokratia bazo, kiu malebligos altrudadon de opinio. La plej utila kaj la plej sukcesa metodo estas ĉiam la konvinkado.

Kamaryt esprimas sinceran dankon al la germanaj samideanoj pro ilia veno kaj pro ilia profunda pripenso de la problemo kaj al ĉiuj pro atentema partopreno en la diskutoj.

Dr. Kamaryt, prez. de ĈAE.

---

## Gvidantaro
### de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista por 1934.

*Komitato:*

*Prez. Dr. Stan. Kamaryt, profesoro, Bratislava, Zochova 3.*
*Vicprezid. Dr. A. Pitlík, ĉefsekretario de la komerca ministerio, Praha II., Křemencová 17.*
*Ĝen. sekr. Otto Ginz, oficisto, Praha II., Bolzanová 1.*
*I. sekr. Jar. Šustr, komercisto, Praha I., Dlouhá tř. 53.*
*II. sekr. Ing. C. Frant. Staněk, Praha XI., Biskupcova 11.*
*Kas. Otto Sklenčka, bankoficisto, Hradec Králové, Masarykovo 628a.*
*Vuk Echtner, oficisto, Nusle II.—741.*
*Jozef Friedrich, fervoj-konsilisto, Košice, Jarná 13.*
*Frant. Heikenwälder, librotenisto, Prostějov, Vrchlického 18.*
*Rudolf Hromada, fakestro, Praha VII., Sochařská 2.*
*Josef Kožený, profesoro, Ml. Boleslav, Nádražní 158.*
*Josef Vondroušek, bankoficisto, Brno—N. Černovice, Školní 69.*

*Vickomitatanoj:*

*Emil Beran, staciestro, Lázně Bělohrad.*
*Dr. Josef Fousek, advokato, Přelouč.*
*Jan Janda, oficisto, Kolín, Komenského 194.*
*Ladislav Krisl, instruisto, Lom u Mostu, Nádražní 351,*
*Miloslav Staněk, Praha II., Příkopy 24 (fa Neff).*
*Anna Tarantíková, oficistino, Praha XI., Karlova 8.*
*Ján Valašťan-Dolinský, instruisto, Turč. Sv. Martin. Mudroňova 31.*

*Membroj de kontrola komisiono:*

*V. Bujarek, Nové Zámky, Hlavná pošta.*
*Vil. Černý, bankoficisto, Hradec Králové.*
*Dr. A. Konečný, advokato, Jaroměř.*
*Inĝ. Rud. Novák, Plzeň, Manesova 59.*
*Frant. Pytloun, fervojisto, Bakov nad Jiz.*

*Vicmembroj de kontrola komisiono:*

*Frant. Hanzelka, Lazy.*
*A. Holancová, Vyškov.*
*V. Střihavka, Kladno.*

---

## Komitataj kunvenoj de ĈAE:

*La IX. komitata kunveno* okazis la 6. III. 1934 en Praha. El la protokolo: Pri la internacia reorganizo de la movado raportis prezidanto de la kunsido Dr. Pitlík. Priparolitaj estis la laboroj de la komisiono, starigita de eksterreg. ĝen. kunveno por efektivigi la unuecigon de la esp. movado en nia lando. Estis pritraktitaj programo de la ĝen. kunveno kaj dato de la venonta komit. kunveno. — Al letero de Prepara komitato de la konferenco „Esperanto en lernejon" Wien, decidite sendi klarigon al la ministerio. — Kiel korporaciaj membroj de la Asocio aliĝis: Grupo Jaroměř, E. K. Brno kaj Kulturklubo Brno. — La agadraporto por 1933 estis sendita al ĉiuj naciaj societoj kun akompana letero. Decidite aĉeti 300 ŝlosiloj kaj 300 flugfolioj „Jeden jazyk" por propagando ĉe redakcioj de ĉsl. semajngazetoj. Kunsido esprimis specialan dankon al s-o Ginz pro bone plenumita laboro koncerne la stacidomajn ta-

bulojn. — Pri la okazanta prelegciklo de s-o Raden raportis ĝen' sekr. Šustr.

*La X. komitata kunveno* okazis la 17. III. 1934 en Praha dum ĉeesto ankaŭ de ekster-Prahaj membroj de la komitato Friedrich — Košice, Heikenwälder — Prostějov, Dr. Kamaryt — Bratislava, Kožený — Ml. Boleslav, Sklenčka — Hradec Král. — El la protokolo: Pri la stato de unuecigaj traktatoj kun la aliaj organizoj raportis Dr. Kamaryt, pri rezulto de la „plebiscito" Sklenčka. — La kunsido rekomendos al la ĝen. kunveno fiksi la daton por la fina starigo de tutŝtata organizo. — Kiel delegito de la Asocio al 26. U. Kongreso en Stockholm estis nomita Dr. Kamaryt. — Kunveno decidis sendi al invititaj korporacioj de konferenco Wien leteron, rekomendantan partopreni. — La kunsido starigis por la ĝen. kunveno liston de kandidatoj por vakiĝantaj lokoj en la komitato. — Decidite eldoni 3000 ekz. de slovak-lingvaj ŝlosiloj (2-a eldono) kaj flugfolion „Pojťtko" en ĉeĥa kaj slovaka lingvoj. — Al s-o Hromada, redaktoro de Ĉeĥoslovaka antologio, helpos en lia laboro s-oj Echtner, F. Staněk kaj prof. Kožený. — La redakcio de „Progreso" promesis pagi la ŝuldon en regulaj partopagoj.

*La I. komitata kunveno* okazis 10. IV. 1934 en Praha. El protokolo: Kompletigo de komitato. Komitaton forlasis s-o Slavík, al kiu vicprez. esprimaas dankon por eminenta laboro en administrado. Novaj membroj de la komitato: S-o Heikenwälder (komitato) kaj s-o Beran (anstataŭanto). Vakan funkcion de protokolisto akceptas Fr. Staněk. (Laŭ pli posta interkonsento fariĝis ĝen. sekretario s-o Ginz, I. sekretario J. Šustr.) — Unuecigo. Referas dro Pitlík. La protokolo verkita de prof. dro Kamaryt kaj publikigota en Bulteno, estis sendita ankaŭ al GEL. Estas legata respondo de kasisto Sklenčka al letero de GEL, en kiu ties delegitoj skribas al li pri sia vidpunkto al ĝenerala kunveno de ĈAE. Estis legita letero de s-o kons. Friedrich pri lia laboro en statuta komisiono. Estas aprobita lia sistemo de laboro. Laŭ sciigo de s-o Friedrich, REL konsentas kunlabori en la komisiono. Dro Kamaryt skribe raportis detale pri laboro kaj traktadoj de kunveno en Ĝenevo, kie li ĉeestis kiel kandidato de UEA-estraro. Pri la unuecigo en ĈSR kaj akcepto de iu ajn ĉsl. asocio en UEA oni ne traktis. — Aliĝo al UEA. Dro Kamaryt konsilas je la letero de UEA, datita la 21. III. al estraroj de landaj asocioj, aliĝi provizore, ĝis estos fondita nova unueciga organizo en ĈSR. Estis decidite, ke la konstituiĝo de tiu ĉi nova organizo efektiviĝu nepre antaŭ la universala kongreso en Stockholm. — Detala raporto de dro Pitlík pri lastaj aferoj organizaj. Bulteno — pri ĝia enhavo kaj pri sendo de aperonta numero al ĉiu, kiu balotis por reorganizo en nia lando. Esperanto-Akademio — pri ĝiaj novaj reguloj, ĝia stato, organiza strukturo kun estraroj kaj fakaj komisionoj. Lingva komitato — pri la ebleco de mempropono de izoluloj al LK pere de sia landa asocio, kiu aldonas sian opinion pri taŭgeco de sinproponanto. — Prelegvojaĝoj. S-o Šustr raportas pri la rezulto de prelegvojaĝo de Mustafa Raden. Ĉar ankoraŭ ne venis ĉiuj raportoj, estos kompleta raporto kompilita post veno de ili. Ankoraŭ nun montras intereson novaj lokoj. Estis aprobite rekomendi en nomo de ĈAE s-on Raden por prelegvojaĝo tra Skandinavio. — La propono de T. Morariu pri prelegvojaĝo tra nia lando. Estis komisiita s-o Šustr trakti pri la afero. S-o Šustr traktas ankaŭ pri kondiĉoj de prelegvojaĝo de s-o Sinha. — Statuto de unueciga organizo. La komitato aprobas sistemon de laboro pri statuto kaj la proponon de Šustr, ke ĝi estu preta ĝis fino de aprilo, por ke ĝi povu esti anoncita al ministerio ĝis fino de majo. S-o Friedrich estas petata finigi laborojn laŭ aprobita dato. — Teknika efektivigo de aliĝo al UEA. Estis legita letero de dro Kamaryt, ke ĈAE provizore aliĝu ĝis fondo de nova centro. Laŭ propono de Ginz la komitato rajtigas la prezidanton, ke li subskribu la oficialan deklaron pri partopreno al UEA kun atentigo, ke nia aliĝo estas provizora ĝis fondo de nova ĉsl. organiza centro.

---

## Julie Šupichová.

Ankaŭ nia fidela membrino, apartenanta inter la 34 membrojn, kiuj estas ĈAE-anoj depost ĝia fondo seninterrompe, estas jam 50-jara. Ŝi naskiĝis 27-an de januaro 1884 en Studenice (Bohemio). Ŝi komencis kiel instruistino en Červený Kostelec kaj Hronov n. M., depost 1910 ŝi estis faka instruistino en burĝaj lernejoj en Praha. En j. 1928—1930 ŝi estis tre malsana kaj estis pensiigita. Kvankam daŭre malsana, ŝi ĉiam persiste kaj intense laboras por nia movado.

Esperantistino ŝi estas depost 1907. Jen listo de faktoj pri ŝia laborado:

Kursoj kaj prelegoj en Červený Kostelec kaj Hronov n. M. 1907—1910. — Ekspozicio en Č. Kostelec (29.—31. V. 1909). — UEA-delegitino por Č. Kostelec depost 1908. — Diplomo, pri kapableco instrui esperanton en lernejoj kaj kursoj ĉe Ekzamena komisiono de Bohema Asocio Esperantista (12. IV. 1909). Sekretariino de „Unua bohema societo esperantista" en Praha en 1910; kursoj kaj prelegoj. — Komitatanino de Bohema asocio esperantista (28. IX. 1910). — UEA-delegitino por Praha depost 1910. — Membrino de Ekzamena komisiono de Bohema asocio esperantista (26. IV. 1915). — Membrino de redakta komitato de La Progreso en Plzeň (1918).

D u m  l a  m o n d m i l i t o: Gvido de „Fraŭlina rondeto" komence en la loĝejo, poste en la Virina klubo (16. II. 1915—30. XII. 1918). — Priesperantaj artikoloj en Náchodské listy, Jitřenka (Hradec Krá-

lové), Časopis učitelek, Kalendář čes. učitelek, Malý čtenář (kurso dum 7 jaroj), Rozkvět (kurso dum 3 jaroj), legita dum la mondmilito precipe de la soldatoj ankaŭ en malsanulejoj, el kio rezultis tre ampleksa korespondado. Artikoloj en Germana esperantisto.

Post la milito: Fondo de Rondeto de esperantistinoj en 1918; ĝia prezidantino ĝis 1923, honora membrino depost 18. VI. 1918. — Ŝtata ekzameno pri esperanto (6. IV. 1922). — Gvidis unuan kurson por kandidatoj de la ŝtataj ekzamenoj, kiun partoprenis 67 p. (1922-3). Anino de Komuna komitato de ĉ. esp-istoj (1919). — Komitatanino de ĈAE (1920). — Membrino de la Loka komitato kaj de estraro de XIII. universala kongreso, prezidantino de faka instruista kunveno dum la kongreso (1921). — Delegitino de la Rondeto de esperantistinoj en Internacia lerneja konferenco en Genève (1922). — Lingva Komitatanino (1923). — Prezidis 11-an kunvenon de Orientbohemaj esp-istoj (1922). — Prezidis fakan kunvenon de virinoj ĉe Univ. kongreso en Nürnberg. — Eldonado kaj redaktado de Esperantský zpravodaj (Esperanta raportanto por Ĉeĥoj), tri jarkolektoj 1920-23. — Delegitino de Říšský svaz učitelek (Tutŝtata asocio de instruistinoj) en konferenco Paco per lernejo en Praha (1927). — Post la malsano: Fondo de „Amikaro de esperanto (1928). — Sendado de ĉiusemajnaj raportoj al Národní politika (kun signo EjŜ); ĝis nun 220 enpresitaj. — Kursoj en gazetoj Klas, Mladý svět, Slovíčko. — Informoj (krom la Národní politika) en České slovo, Právo lidu, Národní osvobození. — Regula rubriko pri esperanto kaj lernejo en List říšského svazu učitelek, Časopis Čsl. obce učitelské, Škola měšťanská. — Artikoloj en Kalendář Slovíčka, Ročenka Čsl. republiky (1931), Spolupráce (1932), Přehled rozhlasu (1933) k. a. Kunlaborantino de Progreso, Ligilo, I. Pedagogia Revuo. — Kunlaboris en „Poradna pro učitelské zkoušky" (konsilejo por instruistaj ekzamenoj) pri specialaj ekzamenoj (esperanto). — Prizorgis testojn por IALA (1931). — Korespondantino de „Korespondа oficejo" de IALA en Berlin (1932). — Honora membrino de UEA (1933).

Verkoj: Malá učebnice esperanta (1917, Šolc, Praha). Učte se esperantu! (1919, Kroužek esperantistek). Učebnice esperanta. II. vydání (1921, Šolc, Praha) aprobita de la lerneja ministerio. Učebnice esperanta. III. vydání (1922, Šolc a Šimáček, Praha). Malá učebnice esperanta (1924, Fr. Hrnčíř, Nymburk). Kniha česko-esperantské konversace (1925, Šolc a Šimáček, Praha). Legu kaj parolu! (1925, Šolc a Šimáček, Praha). Rádce českého esperantisty (1929, Sdružení přátel esperanta, Praha). Učebnice esperanta pro samouky a kursy. IV. vyd. (1933, Šolc a Šimáček, Praha.)

Kiom povas valori la vortoj kompare kun tiu parolo de faroj? Nia kunlaborantino permesu, ke mi simple premu ŝian manon. La manon de gracila virino de malofta vivoenergio. Kaj la simbolo de manpremo estu simbolo de saluto ekster ĉia galanteco! Ĉar tiun fojon la viro volas saluti la virajn virtojn!

*Stan. Kamaryt.*

---

## Prelegvojaĝo de Haĝi Mustafa Raden.

Granda morala sukceso de iam okazintaj prelegvojaĝoj de s-o J. Scherer kaj negro Kola Ajayi donis al ni kuraĝon organizi plian tian prelegciklon tuj, kiam prezentos sin persono, kapabla kontentigi altajn postulojn de nia publiko.

Hinda ĵurnalisto s-o Haĝi Mustafa Raden el Batavia sur insulo Java, estis al ni konata persone jam kelkajn jarojn. Ni konis ankaŭ enhavon de liaj prelegoj, kiujn li laŭ niaj instigoj kaj rekomendoj preparis. Ni do neniel hezitis organizi lian prelegciklon en nia respubliko kaj proponis lin al niaj esperantista kaj neesperantista publikoj en bona espero, ke lokaj esperantistoj morale profitos el ne ofta tiu-ĉi okazo. Ankaŭ finance ni helpis aranĝi la paroladojn, malaltiginte iom honorarion por ili, kompare kun prelegoj de negro Ajayi. Temo de la parolado, kiun s-o Raden akompanis per lumbildoj kaj originalaj javanaj kantoj, estis tre alloga: Java — lando de idealaj virinoj, Bali — insulo de demonoj kaj templodancoj, Krakataŭ — granda vandalo inter la vulkanoj. Ni do fervore eklaboris kun espero de granda sukceso, kiu vere ankaŭ venis.

15. II. 1934 okazis la unua parolado kaj la 22. III. la lasta. Dum tiu tempo (5 semajnoj) okazis en 21 lokoj entute 31 paroladoj kun 9.230 ĉeestantoj kaj du kantadoj en radio. Sekvanta tabelo montras la tutan programon kaj nombron de ĉeestantoj dum la unuopaj paroladoj:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 15. II. | *Prostějov,* | publika | parolado | 130 |
| 16. II. | *Uherské Hradiště,* | lerneja | „ | 500 |
| | | publika | „ | 400 |
| 17. II. | *Uherský Ostroh,* | „ | „ | 250 |
| 19. II. | *Mukačevo,* | lerneja | „ | 900 |
| | dua | „ | „ | 1000 |
| 22. II. | *Prešov,* | „ | „ | 720 |
| | | publika | „ | 306 |
| 23. II. | *Košice,* | „ | „ | 280 |
| | | kantado en radio | | |
| 26. II. | *Tisovec,* | publika | parolado | 550 |
| 28. II. | *Bratislava,* | lerneja | „ | 180 |
| | | publika | „ | 170 |
| 1. III. | *Kopřivnice,* | lerneja | „ | 400 |
| | | publika | „ | 200 |
| 2. III. | *Nový Jičín,* | „ | „ | 210 |
| 3. III. | | lerneja | „ | 150 |
| | dua | „ | „ | 530 |
| 5. III. | *Moravská Ostrava,* | publika | „ | 250 |
| 6. III. | | lerneja | „ | 150 |

kantado en radio

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 8. III. | *Svitavy,* | publika | parolado | 350 |
| 9. III. | *Jaroměř,* | „ | „ | 80 |
| 10. III. | *Lázně Bělohrad,* | lerneja | „ | 33 |
| | | publika | „ | 156 |
| 13. III. | *Úpice,* | „ | „ | 200 |
| 15. III. | *Hradec Králové,* | „ | „ | 232 |
| 16. III. | *Nové Město n. Met.* | „ | „ | 250 |
| 17. III. | *Praha,* | „ | „ | 260 |
| 19. III. | *Plzeň,* | „ | „ | 150 |
| 20. III. | *Český Krumlov,* | „ | „ por Ĉeĥoj | 50 |
| 21. III. | „ „ | „ | „ „ German. | 75 |
| 22. III. | *Třeboň* | „ | „ | 250 |

Multegaj leteroj, kiujn ni de ĉiuj tiuj lokoj ricevis, krom unu (el Mukačevo) ĉiuj parolas pri sukcesoj, kiuj ie estis pli malpli grandaj kaj plej ofte tre grandaj. Iliaj interesaj enhavoj pro manko de loko bedaŭrinde ne povas esti publikigataj.

En Praha ni mem ĉeestis la paroladon. Ni mem denove konvinkiĝis pri altaj kvalitoj de nia hinda samideano kaj liaj prelegoj. Sukceso en Praha estis nekutime granda. Prelegejo de urba biblioteko estis plenplena. Ĉar ĝi havas nur iom pli ol 200 sidlokoj, oni devis alporti ankoraŭ multajn seĝojn, por ke ĉiuj 260 venintoj komforte sidu. Por Praha estas tiu-ĉi sukceso des pli granda, ĉar en la urbo estas ja ĉiam funkciantaj sennombraj distraĵoj, teatroj, kinejoj kaj lumbildparoladoj okazas ĉiutage kelkaj. — La paroladon en Praha ĉeestis multaj personoj, kiuj ne nur vizitis iam la regionojn, pri kiuj s-o Raden prelegis, sed kiuj tie jardekojn vivis!! Vizitinto, kiu 18 jarojn pasigis sur Java, alia, kiu 10 jarojn tie vivis donis plej bonajn atestojn al simpatia nia hindo. Aŭskulti lian interparolon en MALAJA lingvo kun s-o Raden estis por multaj granda surprizo.

La legantoj vidas, ke la prelegvojaĝo estis pli granda ol similaj entreprenoj de nia Asocio iam aranĝitaj. Ankaŭ la sukceso estas multe pli granda. Tamen ĝi povis esti ankoraŭ pli granda, sed kelkaj lokoj bedaŭrinde pro diversaj lokaj cirkonstancoj ne povis s-on Raden inviti au fine eĉ devis sian inviton nuligi, pro apero de alia „konkurenca" entrepreno en ilia loko. —

Ni sincere dankas ĉiujn, kiuj por sukceso de tiu-ĉi prelegvojaĝo meritis aŭ iel laboris. Estus granda alineo, se mi volus ĉi tie sole citi nomojn de tiuj, pri kiuj ni scias. Do koran dankon al ĉiuj!

Ĉar estas espero, ke s-o Raden ankoraŭ unufoje vizitos nian landon veturante al Skandinavio, ni atentigas tiujn, *kiuj volus ankoraŭ aranĝi lian belan paroladon, ke ili laŭeble baldaŭ skribu al nia Asocio aŭ al nia ĝenerala sekretario rekte.* Šustr.

## Helpu la esperantan radion!

Bonaj esperantistoj estas prave kontentaj, ekscitante, ke diversaj radiostacioj disaŭdigas esperanton kaj ili ĝojas, povante aŭskulti per siaj aparatoj nian lingvon. Sed ne sufiĉas tiu interna kontento kaj hejma ĝojo. Ne sufiĉas ankaŭ, se ili entuziasmiĝas pri esperantaj sendoj en la kunvenoj esperantistaj.

Teatraĵo estas prezentata ripete kaj daŭre, se ĝi plaĉas al la publiko. Pri tiu plaĉo konvinkiĝas la direktoraro teatra laŭ aplaŭdo. Montru ankaŭ al la direktantoj de radiostacioj, ke vi ŝatas la esperantajn sendojn. Ĉar aplaŭdo en via hejmo aŭ en la societo esperantista neniel atingos la staciojn, skribu al ili. Tio estas la sola simpla vojo, kiel ili povas ekscii pri viaj ŝato kaj deziroj. Skribu pri la enlandaj sendoj nacilingve al Radiojournal, al la eksterlandaj stacioj en esperanto. Sed skribu kaj ne hezitu elspezi la malgrandan afrankon. Helpu tiel firmigi la pozicion de esperanto ĉe la radiostacioj.

Ĉar ne ekzistas eblo informi ĉiam rapide per gazeto pri la esperantaj sendoj, ni klopodos sendi al interesuloj, kiuj anoncos al ni sian adreson, cirkuleron kun ĉiuj novaĵoj el esperanta radio. Ili devas al ni samtempe promesi, ke ili konfirmos al la stacioj skribe la aŭskulton de la esperantaj disaŭdigoj. La cirkuleroj estos ekspedataj, se estos sufiĉa nombro da aliĝoj.

La esperanta radio ne estas ankoraŭ en danĝero, sed ni alvokas vin jam nun, kiam vi povas sen granda peno helpi tiun gravan aferon: starigi la esperantan radion sur fortan fundamenton.

O. G.

# Kroniko esperantista en ĈSR.

**Germana Esperanto-Ligo** en Ĉeĥoslovakio havis jarkunvenon en Česká Lípa 7. I. 1934. En la agadraporto la prezidanto akcentis rezultojn de la Propaganda semajno, kiuj estis speciale menciindaj en Jablonec, kie oni grandstile propagandis dum la „Bundesfest" kaj en Liberec dum la Foira semajno. Estis restarigita en decembro 1933 gazetara servo, kiu ĉe sia ekfunkcio tuj provizas 150 enlandajn germanajn gazetojn per priesperantaj informoj. Estis akceptitaj propono de la komitato pri aliĝo al UEA kiel kunfondinto kaj pri novaj kotizoj: M 18 Kĉ (M-familiano 12 Kĉ), MJ 40 Kĉ, MA 65 Kĉ, MS 175 Kĉ. El la liberaj proponoj estas menciinda diskuto pri fondo de migranta biblioteko; oni ĝin ne fondis pro multekosteco. La kunveno rekomendis donacadi al publikaj bibliotekoj esperantajn kaj priesperantajn librojn (Esp-o ein Kulturgut, Hurra für nichts). La lasta punkto de la programo estis diskuto pri invito de ĈAE trakti pri unuecigo de la esperanto-organizoj en ĈSR. Fine estis la ligestraro komisiita, „ke ĝi esprimu al ĈAE la emon studadi la principe proponitan kaj detale ellaborotan planon de unuecigo kaj diskonigi ĝian enhavon al la liganoj, por ke ili povu okupi sin kaj decidi pri la plano". Estis elektitaj: Prezidantoj prof. inĝ. Gustav Scholze en Liberec, Rudolf Horn, ŝparkasdirektoro en Krnov, Dr. Josef Pontz, notaria kandidato en Jablonec. Sekretarioj Karl Schüller, privata oficisto en Liberec, Rudolf Rössel, ŝparkasoficisto en Liberec. Kasistoj Marianne König, oficistino en Liberec, Alfred Gahler, konstruteknikisto en Röchlitz. La Ligo eldonas

bultenon „Informilo de Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio", redaktatan de Dr. J. Pontz kaj B. Gahler. Aperas laŭ bezono, sed almenaŭ sesfoje dum la jaro. Por anoj senpage. Adr.: Liberec, Klotildenstr. 6.

**Kunvenoj de nordbohemiaj esperantistoj.** La naŭa okazis en Horní Litvínov la 14-an de januaro, prezidita de prof. Murath. Ĉeestis ĝin krom la nordbohemianoj, anoj de ARE, karavaneto de esp-istoj el Praha, gvidita de nia ĝen. sekretario J. Šustr. S-o Krisl skizis la signifon de ARE por la movado kaj pritraktis poste la demandon de unuecigo de la enlanda movado. Li rekomendis sincere al ĉiuj esp-istoj diversnaciaj la unuecigon en unu tutŝtata asocio. Post li prof. Murath deklaris, ke la celo de ARE dekomence estis atingi la kunlaboron de ĉeĥaj kaj germanaj samideanoj en la regiono kaj doni per tio pruvon, ke paca interkonsenta cellaboro tute facile estas ebla inter diversnaciaj esp-istoj en pli intima kadro. Ĉiuj ĉeestantoj konsentis fariĝi anoj de la fondota tutŝtata asocio, kondiĉe ke la statuto ne kontraŭstaros la ideon de ARE. Parolis ankaŭ s-oj Šustr kaj Staněk klarigante diversajn detalojn kaj la momentan staton de agado pri unuecigo. La ekspozicio de libroj de Heroldo, farita de Šustr, tre interesis ĉiujn ĉeestintojn. — La deka kunveno okazis la 11-an de marto en Ústí n. L. Ĉar ARE jam estis ricevita tekston de projektata statuto de la fondota tutŝtata asocio, oni diskutis dum prezidado de prof. Murath detale pri la tekstoj de diversaj paragrafoj kaj akceptis detalan proponon pri tekstoj de la statuto. La decido estis sendita por ĝenerala kunveno de ĈAE.

**Ŝtataj ekzamenoj.** En Praha la 9. IV. faris ŝtatan ekzamenon pri esperanto s-o Rudolf Kvita; kiel ekzamena komisaro funkciis Dro Pitlík.

**XII-a tutmonda SEL-tendaro en Ĉeĥoslovakio.** En la tagoj de 16-a ĝis 31-a de julio nunjara kunvenos en Baňská Bystrica ĉe rivero Hron sub la montaro Tatry ĉiunaciaj skoltoj-esperantistoj en XII-a internacia tendaro, kiun aranĝos por Skolta Esperantista Ligo la Centro de Slovakaj skoltoj katolikaj. Aliĝoj venis jam el multaj landoj kaj ĈAE rekomendas partoprenon varme al ĉeĥoslovakaj skoltoj. Okazo por korpa kaj spirita refortiĝo por nealta elspezo. Detalojn petu ĉe la Centro de Slovakaj katolikaj skoltoj, Esperanto-fako, Bratislava, Kapitulská 18.

## Radio.

**Brno** kaj ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj sendis la 25. IV. je la 22·30 esperanto-horeton. Programo: 1. Leterkesto. 2. Uverturo al la opero Dvořák: Čert a Káča. 3. Kion ni kuracas en ĉeĥoslovakaj banlokoj? Dialogo. 4. F. Kožik: Aprila pluv' — virina plor'. Humora kabaredo. Ludis kaj kantis anoj de TRAKT.

**Košice.** 23. II. Mustafa Raden kantis javajn kantojn.

**Mor. Ostrava,** 13. II. O. Gadula pri Ĉeĥoslovaka ŝuindustrio. 6. III. Mustafa Raden kantis javajn kantojn. 12. III. O. Gadula pri La situacio kaj ŝancoj de ĉehoslovaka ferindustrio.

---

# Lokaj informoj.

**Praha.** *Ĝen. kunvenoj*: 25. I. Klub malostranských esperantistů, 22. II. Katolika klubo, 23. II. Esperantista klubo, 1. III. Verda Stelo, 24. III. Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj, 5. IV. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto.

**Praha.** Esperantista klubo, Národní 20a: 27. X. F-ino Dandová, vicprez. de katol. esp-istoj parolis pri Jezuinfano de Praha. — 1. XII. Klubestro J. Šustr prezentis nekrologon pri japana senatano Dro Inazo Nitobe. — 22. XII. Klubestro: mortis s-o Felikso Zamenhof, frato de nia Majstro, brazilaj poŝtkartoj kun esp. teksto ĉe la bildo, broŝuro de Kvakeroj, nove aperinta libro „La mistero de l' sango." — 29. XII. Klubestro: mortis fileto de s-o Linke el Lázně Bělohrad. Debato pri unuecigo de esp. movado en ČSR, iniciatita de vicprez. F. Staněk. — 5. I. Al artikolo en Heroldo klarigas la klubestro, ke Kola Ajayi fariĝis viktimo de ia fripono. Daŭrigo en debato el pasinta kunveno pri unuecigo. — 12. I. Klubestro, pri prelegvojaĝo de Mustafa Raden el Javo tra Ĉeĥoslovakio. S-o Ginz pri forsendo, signifo kaj celo de la balotiloj al Hradec Král., pri AELA kaj de ĝi preparata eldono de Ĉeĥoslovaka antologio. Klubestro instigas al veturo al H. Litvínov, kie okazos regiona kunveno ARE. — 14. I. Veturo al H. Litvínov. ĈAE reprezentis J. Šustr, klubon Fr. Staněk, kune veturis ankaŭ f-ino Nyvltová, s-o Bároch kaj Staněk Mil. — 17. I. Vla komitata kunveno preparis novajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj, traktis pri okazanta ĝen. kunveno kaj pri elektoj de nova komitato, decidite aranĝi paroladon de Haĝi Mustafa Raden. — 19. I. Klubestro: raporto pri regiona kunveno de ARE en H. Litvínov. — 26. I. Kunveno rememoris kaj honorigis per leviĝo mortintan usonan esperantiston s-on Dron Šimonek el Chicago. Grandan kolekton de Ĉefeĉ ŝlosiloj en 36 lingvoj ekspoziciis s-o Šustr. — 2. II. Vicklubestro: Pri signifo de esperanto en nacia ekonomio, poste li montris luksan revuon „Malá dohoda" (Malgranda entento), kie li gvidas paĝon Esperanto. Bibliotek. s-o Mil. Staněk sciigas, ke la kluba biblioteko en lastaj tagoj atingis la numeron 1300, poste pri kelkaj kuriozaĵoj el propra fremdlanda korespondado. S-o Čech tralegis kelkajn spritaĵojn el „Verdkata testamento." — 9. II. Estis malfermita kurso por progresintoj. S-o F. Staněk paroladis pri sia instrumetodo, kiun li aplikos en nova kurso por komencantoj. Li uzas „Gajan lernolibron." F-ino Bendová prelegis pri Elmontriĝo de konscienco kaj finis sian paroladon per esp. kanto akompanate de alia

samideanino. Al ŝia temo parolis s-o F. Staněk. — 13. II. Oficiala malfermo de kurso por komencantoj, kiun la klubo aranĝas sub protektorato de Ĉeĥoslovaka Esp. Instituto en lernejo en Uhelný trh. Malferman paroladon havis direkt. de la Instituto s-o Dro Aug. Pitlík, lektoro de esperanto. Ĉeestis 35 lernantoj kaj multaj membroj de la klubo, kiuj venis por konatiĝi kun instrumetodo de kursestro. — 23. II. okazis ĝenerala kunveno de tiu-ĉi plej granda ĉeĥoslovaka klubo esperantista. Post longaj raportoj de sekretario, kasisto, kursgvidanto kaj kelkaj komitatanoj okazis elekto de nova komitato. Prezidanto ree fariĝis s-o Jaroslav Šustr, kiel sekretariojn oni elektis s-rojn Šinták kaj Lešák. Ceteraj funkcioj estis okupataj de malnovaj funkciuloj. — 2. III. kaj 9. III. oni traktis pri diversaj aktualaĵoj, 16. III. s-o Ginz parolis pri Literatura Mondo kaj libroj de AELA, oni varbis por ĝenerala kunveno de ĈAE kaj por parolado de s-o Raden. — 17. III. en salono de urba biblioteko okazis lumbilparolado de hinda ĵurnalisto, samideano Haĝi Mustafa Raden el insulo Java. S-o Raden prelegis pri insuloj Java, Bali kaj Krakataŭ, kaj kantis originalajn kantojn Javanajn. La prelegejo estis plenplena. Eĉ sidlokoj mankis. Ĉeestis 260 personoj. Morala sukceso de tiu prelego estis nekutime granda. La kunvenon okazintan la 23. III. ĉeestis la hinda samideano, kiu dume revenis el suda Bohemujo, kie okazis lastaj liaj paroladoj. Li rakontis pri siaj spertoj dum la prelegvojaĝo, kaj dankis la aranĝantojn.

**Bakov n. Jiz.** Ĉe-kurso de H. Fasce komenciĝis 20. III. — 20. III. Esp. klubo aranĝis pri-esperantan paroladon de prof. Kožený.

**Báňská Bystřice.** En la somero estos en Tatroj tendaro de skoltoj esperantistoj. Jam aliĝis ĉirkaŭ kvardek el 12 landoj.

**Brno.** Esp-ista klubo havis ĝen. kunvenon 28. I. 1934. La kunveno decidis aliĝi al la nova unuigita organizaĵo kun ĉiuj siaj regulaj membroj. La kunveno deziras, ke la nova AEĈ ellaboru statutojn komunajn por ĉiuj esperantistaj grupoj en ĈSR. Nova komitato: prez. Jaromír Hoffner, instr., Brno, Veveří 122, vicprez. Rud. Nečas, sekret. Jos. Vondroušek, kasisto Jan Poláček, bibliotek. Tomáš Borkovec, asesoroj Frant. Baďura, s-ino M. Adamcová, f-ino M. Ondráčková. Vickomitatanoj: T. Kilian, Třebíč, kaj E. Sonnenfeld. — La nove fondita „Kulturklubo" en Brno kun sia aktora fako TRAKT aliĝas al ĈAE kun ĉiuj siaj membroj. — 25. I. Estis malfermita esp. kurso en lernejo „Na Veveří", 28. Radioĵurnalo Brno aran. esp. kurson por siaj aktoroj kaj oficistoj.

**Budyně nad Ohří.** La 27. III. malfermita kurso por komencantoj. Instruas lernejestro Zadák, partoprenas 12. pers.

**České Budějovice.** 10. III. Ĝener. kunveno de E. K. Progreso. Prez.: Jirka, vicprez. Peinlová, sekr. Ždiarský juna, kas. Hofhanzl.

**Česká Lípa.** Ges-roj Hanuš uzis lerte la okazon de Sportista karnavalo 10. II. por tre plaĉa propagando de internacia lingvo. Naŭ belulinoj ornamitaj per unuopaj literoj E-S-P-E-R-A-N-T-O formis atentatan grupon dum la festo.

**Česká Skalice.** Kurson por 24 lernantoj malfermis kaj gvidas faka instruisto s-o Aŭg. Adam. Kurso bone prosperas.

**Hradec Králové.** 28. II. Komuna vespero de novaj kursanoj kaj membroj de la klubo. Kurson gvidas O. Sklenčka. 14. III. Soc. demokratoj komencas trimonatan kurson.

**H. Litvínov.** 14 I. Regiona kunveno de ARE, la samideanoj el Lom kaj H. L. donis belan tetraĵon „En hotelo". Ĉeestis plu ol 50 pers. el multaj lokoj. Ankaŭ vizitis la kunvenon 5 Prahanoj. Por ĈAE ĉeestis ĝen. sekr. Šustr kaj por E. K. en Praha vicprez. F. Staněk.

**Jablonec nad Nisou.** Loka grupo de GEL havis programon regule en ĉiu sia semajna kunveno dum januaro — marto 1934. — Grupo Isermontaro aranĝis kurson por partoprenantoj (germanlingvaj). 28. II. Ĝen. kunv. Nova komitato: Dro Pontz, Hub, Keil, Hübner, Mai, Gahler.

**Jaroměř.** E. Klubo Zamenhof fondita antaŭ jaroj havis sian 8-an ĝeneralan kunvenon 18. I. 1934. La kunveno signifas revivigon de la movado en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Ĝi decidis korporacie aliĝi al nia Asocio. Estis elektitaj: prez. JUDr Adolf Konečný, vicprez. s-ino Frant. Hoffmanová, sekret. Ant. Sedlák, kasisto s-ino B. Šolcová, bibliotek. s-ino Marie Vlčková, domestro Josef Fleischer, komitatano f-ino Konst. Scharfenbergerová, vickomitatanoj J. Ridl, f-ino Marie Androvà, revizoroj s-inoj Marie Vrbacká, Aluška Jírková, Rudolf Vrbacký. — La klubo eldonis 2 propagandajn ĉeĥlingvajn poŝtkartojn, kiujn ĝi dissendas al taŭgaj adresoj en la urbo. — Kurso depost 1. II. havas 15 partoprenantojn. — Kunvenoj semajnaj ĉiun ĵaŭdon en restoracio U modré hvězdy estas bone vizitataj. Informa tabulo antaŭ la kluba ejo daŭre surhavas diversan propagandan kaj informan materialon. La lokaj gazetoj enpresas ofte informojn ricevitajn de la klubaj funkciuloj.

**Jičín.** Esperantan kurson por 22 lern. gvidas inĝ. Mareš. Rondeto en Jičín kunvenas regule lunde.

**Josefov.** 25 I. Priesp. parolado kun lumbildoj. 1. II. Komencis esp. kurso. — 16. III. Parolado de H. M. Raden. Ĉeestis gastoj kaj samideanoj el tuta ĉirkaŭaĵo, malfermis ĝin s-ro Lederer, tradukis s-ro Sklenčka el Hradec Král.

**Kolín.** Jara kunveno de la klubo okazis 27. I. 1934. Nova komitato: prez. Jan Janda, vicprez. f-ino Anna Weberová, sekret. Jan Václavek, kas. Václav Karel, bibl. Jaroslav Staněk, protokol. f-ino Karla Mašková.

**Košice.** 8. I. Komencis esp. kurso por komencantoj en ŝtata reallernejo, instruhoroj ĉiam ĵaŭde.

8. I. Komencis esp. kurso en industr. lernejo. — Parolado de Mustafa Raden la 23. II. havis bonan moralan kaj financan sukceson. 280 ĉeestantoj. Krome kantis M. R. orientajn kantojn per Radio-Košice kun esp. klarigoj; tradukis J. Friedrich. — 21. III. okazis ĝen. kunveno de la Esperantista Klubo. Oni konstatis pliviglliĝon de la loka movado, speciale inter skoltoj. La klubajn kunvenojn partoprenas ĉiam 15—20 pers. La urbo donis ankaŭ por la j. 1933 al la klubo subvencion 100 Kč. La klubo abonis 7 gazetojn kaj estas membro de AELA. La nova komitato: Prez. J. Friedrich, konsilisto de ŝt. fervojoj, vicprez. A. Hájek, kapitano, sekret. J. Maštalíř, fervojisto, bibliot. L. Janeček, ĉefo de mallibrejo, kas. J. Györgyi, poŝtoficisto, protok. Tibor Bobula, studento.

**Kukleny.** Urba biblioteko enhavas nun ankaŭ pligrandan parton de esp. libroj.

**Kutná Hora.** 9. II. Ĝen. kunveno en hotelo „Černý kůň."

**Lázně Bělohrad.** Italo Hektor Fasce, Cseh-metoda instruisto, gvidis depost 4-a de septembro 1933 ĝis fino de la jaro du kursojn por plenaĝuloj, 1 por lerneja junularo, 1 por progresintoj. La kursoj tre sukcesis. La klubo eldonis kaj dissendis presitan cirkuleron rekomendantan aranĝon de kursoj de H. Fasce, de kiu 10. I. la lokaj samideanoj adiaŭis. La vesperon ĉeestis ankaŭ la urbestro mem. Por la urba konsilantoro parolis s-ro Schütz, kiu poste transdonis al s-ro Fasche belan albumon de la urbo. 10. III. parolado de Mustafa Raden.

**Levice.** Kurson malfermis 18. X. 1933 s-ro Viktor Hédvéghy.

**Liberec.** Loka grupo de GEL havis dum januaro-marto regule programon en ĉiu semajna kunveno.

**Litoměřice.** Esp. kunvenoj estas regule ĉiun duan kaj kvaran mardon en hotelo „Rumburk". — 23. I. Dum la kunveno unu samideanino montris multajn lumbildojn. — 23. I. komencis esp. kurso por germanoj.

**Lubná, p. Sebranice u Litomyšle.** Rondeto kun 15 anoj fondita. La gvidanto s-ro Josef Buben, Lubná 30, deziras varbi por ĈAE kaj UEA.

**Mladá Boleslav.** 6. II. Ĝener. kunveno kun amuza vespero. — 5. III. Komencas novaj Cseh-metodaj kursoj, instruas itala samideano Fasce. — 29. III. Koresp. vespero, per kiu la klubo volas montri al publiko praktikan uzadon de esperanto. Venis pli ol 50 salutoj el 15 landoj.

**Mnichovo Hradiště.** La 22. I. 1934 okazis laŭ iniciato de s-o Pytloun prelego kaj provleciono de Hektoro Fasce. Al la Cseh-metoda kurso aliĝis 15 p.

**Moravská Ostrava.** Solena kunveno je memoro de 74-a datreveno de naskiĝo de Zamenhof estis aranĝita de REL, Klubo de ĉeĥaj esp-istoj en Moravská Ostrava, Loka Grupo de GEL, Rondeto de ĉeĥaj esp-istoj en Slezská Ostrava. Ĝi okazis 17 XII. 1933 en popola lernejo en Mariánské Hory, ĉeestis 100 p. Malfermis la solenon inĝ. Lad. Krajc, pri Zamenhof parolis ĉeĥe O. Gadula, pole J. Poncza, germane L. Krysta. — La K l u b o de ĉeĥaj esperantistoj havis jaran kunvenon la 23. I. 1934 en Lidový dům. Partoprenis pli ol 50 personoj. Nova komitato preskaŭ senŝanĝa (tamen ni ŝatus scii la nomojn. — Red.). Inĝ. Krajc parolis pri nova organizo. La klubo atingis ĉe du grandaj ĵurnaloj de tiu regiono, Duch času kaj České slovo, ke ili aperigas semajnan rubrikon priesperantan. Ankaŭ la ceteraj gazetoj ofte publikigas artikolojn. Pasintjare estis aranĝitaj 3 kursoj kaj 3 novaj kursoj estas preparataj. 29. XII. 33. En la kunveno de „Ligo de laboristaj turistoj" parolis s-ro J. Sedzimír pri internac. lingvo esperanto. — 8. I. 34. En komitata kunveno de fervojista grupo rekomendas s-ro Kožušník aranĝi vesperan esp. kurson. — 26. I. 34. La fervojista grupo rekomendas en gazeto „Budoucnost" al siaj membroj aliĝon en esp. kurson. Klubo de ĉeĥaj esperantistoj aranĝas la kurson por komencantoj kaj progresintoj.

**Nový Jičín.** Ĉiuj tri paroladoj de H. M. Raden tre bone sukcesis: multe helpis kunlaborantaj s-oj gimn. direkt. Pollák, instr. Lakota kaj direkt. Krumlička, tradukis R. Kvita.

**Olomouc.** La Esperantista societo en Olomouc okazigis la 15. II. 1934 sian ĝen. kunvenon. Partoprenis 17 personoj. Nova komitato: prez. Ant. Kudela, vicprez. Alb. Neužil, sekr. Vaněk, vicsekr. Mílek, kas. Mrázková, bibl. Pittner, ases. Golla. Kunvenoj ĉiuĵaŭde je la 19-a h. en Litovelská pivnice, Mořické náměstí. La societo posedas 422 librojn kaj gazetjarkolektojn, envicigitajn en publika biblioteko de la urbo Olomouc. La societo elmetas ankaŭ gazetojn en publika legejo. La 17. II. komencis s-ro Neužil Ĉe-metodan kurson en ejo de Komerca akademio kun 23 partoprenantoj. AK

**Plzeň.** E. K. Plzeň I., kunvenas ĉiun sabaton en restoracio „U nové pošty" je 20-a h. — 17. II. Ĝen. kunveno. — 26. II. Esp. kursoj por komencantoj aranĝataj de Lidová univer. Husova. — 4. III. Duontaga ekskurso, gvidis s-o Hofmann. — 12. III. Komencas nova 10 semajna kurso en „Peklo". — 19. III. Parolado de Raden en Urba muzeo.

**Postoloprty.** 24. I. Ĝenerala kunveno; prez. inĝ. F. Fiška, sekr. P. Cahák, lernejestro el Skupice. En proksimaj tagoj aranĝos la klubo esp. kurson kaj paroladon de Mustafa Raden el Javo. — 29. I. surprizis nin tute neatendita morto de nia nove antaŭ 5 tagoj elektita prezidanto s-o inĝ. Fiška. Li mortis en malsanulejo Louny post rapida operacio je cekumo. En li ni perdis personon, kiun ni por loka movado longe serĉis. — Sur la katafalkon estis metita granda florkrono en formo de esp. stelo; sur la pendantaj rubandoj estis la surskriboj „Dormu

trankvile" jak „Esperantista klubo". Cindrigita li estis en Most. — 18. II. Festa malfermo de esp. kurso komencis per esp. himno. Je temo „Esperanto por moderna homo" estis parolite ĉeĥe kaj germane. Krom tio estis luditaj esp. gramofonaj diskoj. Ĉefa aranĝanto de esp. movado en tiu ĉi loko estas ŝt. ekzam. instr. de esperanto lernejestro s-ro P. Cahák el Skupice apud Postoloprty.

**Prešov.** Vigla esperantista rondo en Prešov komencis novan jaron de sia agado per bela sukceso. Dank' al kelkaj fervoraj samideanoj disvastiĝis nia ideo inter studentoj kaj publiko de nia urbo. La 22an de februaro ni aranĝis du paroladojn de Mustafa Raden, kiujn vizitis pli ol 1000 ĉeestantoj. Intereso pri esperanto estis tiel granda, ke ni devis tuj du tagojn poste (24. II.) aranĝi paroladon pri esperanto, kiun faris komitatano de ĈAE s-ro fervoja konsilisto J. Friedrich el Košice antaŭ 300 aŭskultantoj, inter ili kelkaj profesoroj. F-ino Neckárová deklamis poemon „Marinjo Magdon" en traduko de D-ro Schulhof. Bone aranĝitan vesperon finis ĥoro da 40 gestudentoj per esperantista himno sub la gvidado de ilia profesoro. — Nun ni gvidas du esperantajn kursojn, por studentoj kaj publiko. En nia stacidomo vi trovos esperantan tabulon, kiu vin informos pri nia kunvenejo. Vizitu nin kaj nian belan Slovakujon!

**Prostějov.** 31. III. Dum la paskaj tagoj festis klubo 25an datrevenon de sia fondiĝo. En la riĉa programo partoprenis ankaŭ esperantistoj — membroj de Landa teatro el Brno.

**Přerov.** 31. III. Paska kunveno de moraviaj esperantistoj okazis kun bela programo (laborkunveno, ekskurso tra urbo kaj art. akademio), partoprenis esp. aktoroj el Brno.

**Radvanice.** Ĝen. kunveno de la Esperantista klubo „Nova vivo" 28. I. Nova komitato: prez. Ant. Glet, vicprez. J. Dvořáček, sekret. J. Hanzelka, kas. J. Taraba, protokol. f-ino Seibertová. Kunvenoj merkrede je 19-a h. en restoracio Břeněk.

**Rožnov p. R.** Du paroladoj de H. M. Raden. Tradukis s-ro Kvita.

**Rychnov u Jablonce n. N.** Kurso depost 22. I. 1934 (germanlingva). La grupo „Verda stelo" elektis prez. f-ino Wanda Wabersich, kasistino f-ino Marie Schiffner, sekretario Oskar Seiboth.

**Stonava.** Propaganda kunveno de REL 11. III.

**Tisovec.** 26. II. Esp. klubo „Comenius", parolado de H. M. Raden, tre bona sukceso.

**Třeboň.** Kurson por komencantoj aranĝis en vintro 1933 loka grupo de Junularo de nacie socialista partio. Instruis s-ro F. Paťha, faka instruisto. — La 22. III. okazis ĉi tie lumbildparolado de sinjoro Haĝi Mustafa Raden en urba kinejo. Partoprenis ĝin 250 personoj, al kiuj la parolado tre plaĉis kaj valora ĝia enhavo plene kontentigis ĉiujn. Tiu ĉi parolado certe plenumis sian taskon kaj konigis al nia publiko belan nian lingvon. Ni devas diri: Ĝenerala impreso estis belega kaj bonega. — 25. III. Publika esp. ekspozicio por konatigi la publikon kun nia literaturo kaj aliaj.

**Třinec.** Regula kunveno de REL en Laborista domo.

**Turnov.** 10. I. Esp. vespero, parolis direktoro de reallernejo Tureček kaj prof. Kožený. S-ro Fasche donis provlecionon laŭ Cseh-metodo. — Pro instigo de s-o Pytloun estis fondita 14. III. nova klubo. Estis elektitaj prez. direktoro Tureček, vicprez. Jos. Knebl, sekretariino s-ino Sláva Valešová, kasistino Marie Matějcová, komitatanoj Štefa Štromhausová, Kamila Tvrzská, Jan Černý. La kurso de italo Fasche estis depost januaro 1934 kun 20 p.

**Uh. Hradiště.** Slovaka Esperanto Klubo en Uh. Hradiště okazigis sian I-an ĝeneralan kunvenon la 14-an de marto 1934 en restoracio „u Pilátů". La kunvenon, kiun ĉeestis 33 personoj, malfermis kaj direktis prez. R. Kubíček, artpentristo. Post laŭtlego kaj aprobo de detale ellaborita protokolo oni pritraktis la gravajn klubajn aferojn. Prezidanto kun danko konstatis la veran entuziasmon de la membroj, kiuj en relative tre mallonga tempo kunlaborinte kun amo kaj vera konvinko al nia movado starigis en Slovaka regiono fortan bazon por plua disvastigo de niaj ideoj. La plej vasta publiko scias pri ni kaj nia devo estas, per serioza kulturlaboro konstrui fortan ponton, helpe de kiu ni atingus la duan bordon, tio estas ekkapto de ĉiuj ceteraj pacamikoj. Poste oni elektis la jenan komitaton: Prez. Ruda Kubíček, I-a vicprez. R. Vilémová, II-a vicprez. Emil Philadelphy, sekr. H. Kořínková, kasisto Fr. Kopřiva, arkivisto J. Tichoň, koresp. L. Tlustáková, revizoroj M. Floriánová kaj V. Stiassný. La elekto okazis ĉiuvoĉe. Krom tio oni decidis fondi kelkajn fakojn en la kadro de la klubo. La stacidoma tabulo estis mendita.

**Vítkovice.** 24. I. komencis kurso por komencantoj kun 27 p. kaj por progresintoj kun 12 p. en „Popola lernejo" (neoficiala). Instruas s-o Vladimír Slaný.

**Vodňany.** Pasintjare fondita E. K. La Progreso aranĝas por 35 partopren. duan kurson. — 6. I. Amika vespero en hotelo Mašek, en riĉa programo helpis amikoj el Č. Budějovice. La ĉeesto de la publiko estis tre bona.

**Žilina.** Fonda kunveno de E. klubo kunvokita de s-ro Goldstein okazis 17. I. 1934. Prez. MUDr. J. Hofman, klubestro L. Goldstein, kas. J. Waldhaus. Kunvenoj ĉiun vendredon. Kotizo 12 Kĉ.

---

# Informoj.

**26-a Universala kongreso de Esperanto** okazos en Stockholm, la 4.—11. VIII. Ĝis la 31. III. aliĝis 1100 personoj el 20 landoj. Kongresa kotizo 25 sv. kr. Programo: 4. VIII. Malferma soleno en

la bela Koncerta domo de Stockholm. — 5. VIII. Esperantodiservoj protestanta, katolika kaj juda, belega koncerto de „Siljanskören" (Kanthoro el Dalekarlio) en la Koncerta domo. — 6. VIII. Akcepto de la Urbo kun lunĉo en la Ora Salono. — 7. VIII. Festo ĉe Skansen, fama subĉiela muzeo kaj bestoparko, kun muziko, popoldancoj, paroladoj ktp. — 8. VIII. Teatra prezentado en Esperanto de svedaj profesiaj aktoroj sub gvidado de unu el la plej eminentaj svedaj reĝisoroj, Sandro Malmqvist. — 9. VIII. Literatura Vespero kun tre varia programo. — 10. VIII. La granda kongresa balo en la Blua Halo de Urba Domo, la plej bela festa salono de Stockholm. — 11. VIII. Solena fermo de la Kongreso. Ĉiu partoprenanto ricevos belan kongresan insignon kaj ĉiujn kongresdokumentojn, povas partopreni en 20 fakaj kunsidoj kaj en la ĝeneralaj kunsidoj de UEA (en la sveda parlamentejo). La Sveda Filmasocio faros filmon pri la plej gravaj kongresaj okazaĵoj. — Estos ricevataj rabatoj ĉe fervojaj vojaĝoj, ekskursoj, ekz. 3.000 km unusemajna vojaĝo de Stockholm al la plej norda Laplando, por la mirinde malalta prezo de 150 sved. kr., enkalkulite vojaĝo, loĝo, gvidado, trinkmono! Svedlando estas jam duone konkerita de la svedaj esperantistoj. Se vi venos al la kongreso, la plena venko certe tuj venos! Adreso de L.K.K.: Fredsgatan 4, Stockholm.

**Esperanto-paroladoj pri Ĉeĥoslovakujo en Francujo.** La Esperantista grupo en Dunkerque preparas por plej proksima tempo la aranĝon de publika parolado pri Ĉeĥoslovakujo. La grupo petas ĉeĥoslovakajn societojn esperantistajn kaj bonvolajn samideanojn, ke ili afable alsendu ĉiun taŭgan materialon, kiu estos utiligota ankaŭ dum venontaj paroladoj en aliaj lokoj. Ni varme subtenas la peton de niaj amikoj francaj. La adreso: S-ro inĝ. E. Houze por Esperantista grupo, 121, rue G. Neuts, Malo-les-Bains par Dunkerque, Francujo.

## Agrablan libertempon

— plej malmultekoste — inter samideanoj vi travivos en Lázně Bělohrad. La bela trankvila banloko atendas plezure la esperantistajn gastojn. Postulu detalojn de Esperantista klubo Lázně Bělohrad!

---

## Esperantista vivo.

Anĉi Nývltová kaj Jaroslav Bároch, Praha, 31. III. geedziĝis. Sinceran gratulon!

**Morto.** 29. I. en Louny inĝ. F. Fiška, klubestro en Postoloprty. Laŭ reveno de la Bulteno ni eksciis pri morto de s-o Ladislav Procházka, instruisto el Pelhřimov. — Al iliaj familioj ni sendas esprimon de kora kunsento.

---

## Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana de Eugen Wüster.

Eldono de tiu ĉi granda verko, grava kaj necesa por ĉiu serioza esperantisto, estos daŭrigata, se anoncos sin almenaŭ kvin cent interesiĝantoj por la ankoraŭ aperontaj 3 volumoj. Prezo de 1 volumo proksimume 120 Kč. Ĝi manku en neniu kluba biblioteko. La tuta verko konsistas el 7 volumoj, el kiuj 4 jam aperis, kaj estas havebla por favora prezo. La mendojn akceptas ĈAE aŭ rekte Ferd. Hirt Sohn, Esperanto-fako, Leipzig C 1, Salamonstr. 15.

**Katalogo de esperanto-gazetoj** aperos dum majo. Prezo 15 Kč, por antaŭmendintoj 12 Kč kun 10% por afranko. Mendojn akceptas A. Pražák, Jablonné n. Orl.

**Tutmonda Asocio Kolektanta** estis fondita en la j. 1932, ĝi havas 102 membrojn el 21 landoj. Ĝi estas la sola internacia esperantista faksocieto de kolektantoj. La anoj ricevas por la jara kotizo de Kč 31·— gazeton, bultenon, jarlibron kaj povas uzi diversajn servojn. Interesemuloj ricevos kontraŭ afranko por respondo informojn de la kasisto: F. V. Mizera, Jablonné n. Orl.

**Al Aŭstrio.** Okaze de Internacia Konferenco „Esperanto en la lernejon kaj la praktikon" (19. ĝis 24. V. 1934 en Wien) eldonis Federacia ministerio por komerco kaj trafiko Wien, belan faldprospekton kun 28 bildoj de vidindaĵoj en Aŭstrio.

---

*ESPERANTISTOJ!*

*Ni rekomendas al vi gazetojn, aboneblajn pere de nia sekretariejo. La plej malkara esperanta gazeto, redaktata de profesiaj ĵurnalistoj*

*NIA GAZETO*

*sendependa organo, libera por ĉiuj, monata, grandformata, okpaĝa, ilustrata. Abonprezo 3 sv. frankoj. Provnumero nur kontraŭ respondkupono. Adreso: Nia gazeto, NICE (Francujo) 29 av. de Victoire.*

*Sola humorista gazeto esperanta*

*LA PIRATO*

*kajeroj por satiro, humoro kaj libereco... relativa. Ĉefredaktoro Raymond Schwartz. Unujara abono (12 numeroj) 12 fr. frankoj.*

*Administracio: J. Solsona, 9, rue Hallé, Paris 14e.*

---

FILOZOFIA VORTARO

verko de D-ro St. Kamaryt, dokumentas la taŭgecon de esperanto por sciencaj celoj kaj la riĉecon de esperanta vortrezoro. Eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Binditan ekzempleron por 28 Kč liveras la oficejo de ĈAE.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík.
Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102 047-VII-1933.